DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

# Sonorilo

66A JARO, N-RO 1
JAN. FEB. 1974
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St.-Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken.
Poŝtĉekkonto : 1634.34 de BEF, Oude donklaan 83, B-2100 Deurne.
Prezidanto : D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.
Redakcio : Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne
Ĉefredaktoro : Fernand Roose
Redakcia sekretario : Paul Peeraerts

## SUR LA KOVRILO

Unu el la ĉarmaj lokoj de Lieĝo, kie ĉi-jare okazos la Belga Esperanto-Kongreso. Lastajn detalojn pri tiu okazontaĵo aliloke en tiu ĉi numero.

## FONDAĴO H. JAUMOTTE-LOQUET

| | | |
|---|---|---|
| Antaŭa saldo | : | 143 005 fr. |
| S-ro Van Gompel | : | 250 fr. |
| Nuna kapitalo | : | 143 255 fr. |

Aldonaj pagoj estas akceptataj pere de la pĉk. n-ro 291429 de G. Maertens Brugge 3.
Donacoj al la Fondaĵo pere de oficiala akto estu adresitaj al Belga Esperanto-Federacio, asocio leĝa, por la Fondaĵo. Antaŭdankon !

## ĜENERALA JARKUNVENO DE BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

La estraro de Belga Esperanto-Federacio havas la honoron inviti ĉiujn siajn memorojn ĉeesti la ĝeneralan jarkunvenon kiu okazos sabaton, la 16-an de marto 1974, je la 15-a horo en la granda salono de la stacidomo Bruselo Norda. Interesitoj estu en la giĉethalo de la stacidomo kelkajn minutojn antaŭ la komenciĝo. De tie oni gvidos vin. Personoj kiuj alvenas ne ĝustatempe povas direkti sin al la giĉeto "Informoj" en la sama halo, kie oni donos pliajn instrukciojn.

La tagordo de la jarĉefkunveno mencias :
- Moralan raporton de la sekretario
- Financan raporton
- Aprobon de ambaŭ raportoj
- Elekton de la proponitaj grupaj administrantoj

Ni menciu krome ke la saman tagon okazos la oficiala prezento al la publiko de la franclingva kurso "L'Esperanto sans peine" en la Internacia Librofoiro (Rogier-centro). Pri tio vi legos aliloke en tiu ĉi numero.

## PERSPEKTIVOJ POR ESPERANTO ?

Preskaŭ ĉiutage ni povas indigniĝi pro stultaj situacioj kreitaj sekve de la lingvodiverseco en la mondo kaj pro la nesolvado de tiuj situaciaĉoj, kvankam la rimedo kuŝas antaŭ ni. Rigardu en la televido ekz la mokridindajn lecionojn pri Nederlanda lingvo por gastlaboristoj. Laŭ tiu metodo tiuj lastaj povos lerni dum la tuta vivodaŭro, kaj ili ne ankoraŭ konos la nederlandan lingvon. Ili konos nur kelkajn vortojn kaj frazojn cele al elsaviĝo en plej necesaj cirkonstancoj. Sed neniam ili povos havi veran interhoman kontakton kun la tiel nomataj gastigantoj kaj fakte ili restas aparta, kaj ofte evitata grupo. Ne malofte ni povas legi en la gazetaro ke iuj taskoj - ekzemple en la Eŭropa Ekonomia Komunumo - estas en prokrasto ĉar... la tradukoj ne ankoraŭ estis pretaj ! Dume tiuj tradukadoj kostas sumegojn, kies pagoj venas el via kaj mia poŝoj; pagoj eviteblaj kaj senutilaj. Eĉ ni kelkfoje povas legi pri akcidentoj kaŭze de lingvaj miskomprenoj !

Se ni observas la situacion ĉe politikaj kaj ekonomiaj gvidantaj personoj, ni efektive vidas ke ne malmultaj inter ili konas unu de la plej disvastigitaj lingvoj, ni diru la anglan. Sed ne malofte ni vidas ankaŭ ke aliaj bezonas interpretiston. Imagu ! Gvidantoj de la mondo kiuj ne kapablas rekte interparoli! Oni povis kompreni tion antaŭ jarcentoj kiam unu mondparto estis tute ne konata de alia mondparto. Sed nun dum la mondo pli kaj pli unuiĝas! Kaj tiun konstaton ni faras ankoraŭ multe pli okaze de internaciaj renkontiĝoj de la malpli altrangaj personoj.

Indigniĝi ni povas ankaŭ pri la homa vanteco en tiuj aferoj. La kelkaj altrangaj funkciuloj kiuj kapablas iom bone regi alian lingvon sentas plejofte iun handikapon kiam ili intertraktas kun kolegoj en ilia lingvo. Sed antaŭ propra publiko ili malhumilas ĉar ili " konas " tiun alian lingvon...kaj internacian lingvon ili do "certe" ne bezonas ! Kaj la aliaj kiuj ne konas tiun fremdan lingvon? "Nu, ili lernu ĝin". Tiel rezonante ili restas blindaj antaŭ la evidento ke la plimulto de la homoj ne kapablas regi alian lingvon tiel perfekte ke ili estas tiurilate la egalaj de la kunparolanto. Plej paradokse ili estas ne malofte la personoj kiuj - laŭ demokrata principo - predikas instruadon por absolute ĉiuj homoj kaj partoprenon por ĉiuj en la mondaj kulturo kaj turismo. Nur la neeviteblan lingvan baron ili ne volas vidi. "Lernu multajn lingvojn" ili konsilas. Do la "kompetentaj" instancoj pristudas novajn metodojn ĉar ĝis nun la lingvo-instruado ne portis multajn fruktojn. Tiuj novaj metodoj alportas novajn kostojn. Ne gravas. Sed la rezultoj restas nulo. Ni antaŭmetas Esperanton. Ilia reago : iu rideto, multaj kontraŭargumentoj aŭ...ne scii kion diri kaj fari. Vere la homo ne estas logika estaĵo. Li estas psikologi(k)a estaĵo. Tio signifas ke li povas agi laŭ impulsoj kaj laŭ influoj, ofte kontraŭ ĉiu racio.

Ĉu do ni devas malesperi ? Ne. Sed ni devas pacienci. Ni devas prikonsideri du aferojn. Unu.
La lingvoproblemo estas realaĵo. Ĝi ne estas teorio. Se ĝi estus nur teorio, ni povus dubi pri ĝusteco, evoluo kaj estonteco. Du. La nacioj pli kaj pli kuniĝos. Do ĉiam pli kaj pli okazos internaciaj renkontiĝoj, vojaĝoj. Tio iras paralele kun la fakto ke pli kaj pli da homoj recevas instruadon, iĝas (duon) kleraj kaj partoprenas (kulturajn) kontaktojn kun eksterlandanoj. Ĉiam kreskanta nombro da popoloj iĝos "civilizitaj" popoloj - kiuj ludos ankaŭ politikan rolon. La kostoj de la lingvodiverseco same rapide altiĝos (pro tradukoj, kaj similaj). Tiu situacio evoluos al krizo, se iom paroli laŭ K. Marx. Do, iam oni devos trovi solvon. Do la ŝanco de Esperanto ne venos unuavice sekve de homa logiko kaj bonvolemo, sed sekve de la evoluo.

Kion ni devas fari intertempe? Unu. Partopreni en la Esperanto-vivo. Paroli, korespondi, legi revuojn

kaj librojn. Tio faros ke Esperanto restos kiu ĝi jam estas:plenvalora lingvo kaj kulturfaktoro. Du. Esti tre prudentaj en niaj argumentadoj kaj teoriumoj rilate internaciajn instancojn, kongresojn, intertraktadojn. Atendi la oportunan momenton, kaj tiam evidentigi la stultajn situaciojn kaj nesolvitecon de la problemoj. Tio plej efikas se oni povas prezenti la situaciojn mokridige, ne kolere, ne indigne, ne patose; sed klare, trankvile , "malvarme". Tri. Doni objektivan informadon pri Esperanto. Tio estas en si mem la plej bona propagando. Montri revuojn kaj librojn. Informi pri la laboroj kaj eblecoj de la UEA-delegita reto; pri la internaciaj kongresoj; pri lernejoj kaj universitatoj kie Esperanto estas instruata. Komuniki faktojn. Kolektantojn impresos via bela kolekto de (filatele) afrankitaj leterkovertoj. Literaturamantojn impresos ke Tolstoj estis esperantisto, ke Martin Fierro, Kalevala, La Dia Komedio, Baudelaire, Heine, Lusin, kaj multaj aliaj ekzistas ankaŭ en Esperanto, ke pere de Esperanto vi povis ekscii pri 15-jarcenta poeto el malproksima Uzbekistano. Al politikistoj impresos ke la Aŭstria prezidento Franz Jonas estas Esperantisto, ke en la Brita parlamento ekzistas grupo de parlamentanoj-esperantistoj (ĝuste en Anglujo!). Al religiaj personoj impresos ke la Biblio, la Korano kaj parto de la Bhaghavad Gita estas tradukitaj en Esperanto, kaj ke regule aperas "Biblia Revuo" por bibliaj studoj. Lingvistojn interesos la scienca "La Monda Lingvo Problemo". Al la ĝeneralaj distribuantoj de aŭto-vendado sendu la belajn prospektojn en Esperanto de Fiat. Al la direktoroj de turismaj oficejoj (kaj eventuale al la skabeno de la urbestraro) sendu ekzempleron de esperantlingva faldfolio pri alia urbo. Tiel mi povus kunmeti ankoraŭ longan liston.

Ĉion tion nia junularo povas fari iom pli brue kaj iom pli senpacience. Ilia agado devas malsimili tiun de la ne plu junaj personoj. Cetere ili direktas sin unuavice al siaj junaj gekamaradoj.

Ĉu intertempe vi ne rimarkis ke perfektiĝo en Esperanto kaj aktiva partopreno povas grandmezure pliriĉigi nian vivon ? Kaj kiam ni estas enmiksitaj en debatoj, aŭ ke hazarde iuj pensas ke ili devas ataki niajn konceptojn, nian lingvon, nian movadon, konsciu bone ke ni havas ĉiujn atutojn por iĝi la pli fortaj, kaj por evidentigi la pravon de nia agado.

F.R.

---

INTERNACIA LINGVO-KURSOJ EN BURGAS

Sub la aŭspicio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj la gvido de d-ro Istvan Szerdahelyi kaj kun helpo de Andrzej Pettyn el Varsovio, okazos en Burgas (Bulgarujo) internacia Pedagogia Esperanto-Seminario de la 11-a ĝis la 24-a de aŭgusto. La kotizo estas 70 levoj, inkl. loĝadon, nutradon kaj instruadon.
Por pliaj informoj adresu vin al : Ogkrâĵen Esperantski Komitet, bulv. Ĥristo Botev 97, Sofia 3, Bulgarujo.

Belgaj instruistoj skribu al la Ministerio pri Edukado por peti subvenciojn por tiu ĉi aranĝo!

LA BELGA ESPERANTO-KONGRESO EN LIEĜO

Kongresa Komitato: Ges. Denoël, rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Ampleksaj informoj: vidu la antaŭan numeron de "Sonorilo".

Lastaj novaĵoj :

- La nombro de partoprenantoj je 74 02 06 estis 131.
- La katolika Di-servo estos celebrata en preĝejo-ŝipo, de Pastro A. Beckers, honora prezidanto de IKUE.
- La poŝta administracio akceptis ke dum du tagoj (sabato kaj dimanĉo), speciala stampilo pri la kongreso estos oficiale uzata en la kongresejo mem.

NOVA STATUTO de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio sen profitdona celo.

(akceptota dum la Ĝenerala Jarkunsido de 16-3-1974)

---

La Statuto, publikigita en la anekso de la Statgazeto de 18-1-1962, estas adaptita al la cirkonstancoj kaj aspektas nun jena :

Par. 1-a :
La Societo estas starigita sub la nomo : "Belga Esperanto-Federacio" (Belgische Esperanto-federatie; Fédération Belge pour l'Esperanto).

Par. 2-a :
La sidejo de la societo estas fiksita en Hoboken, Sint-Bernardsesteenweg 1078, sed povas esti translokita, kien ajn en Belgio, per nura decido de la administrantaro.

Par. 3-a :
La ĉefa celo de la societo estas : la progresigo, per ĉiuj taŭgaj rimedoj kaj precipe en propra lando, de la internacia lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas kunmetita de sia aŭtoro, D-ro Zamenhof, kaj fare de la postsekvintaj decidoj de la Akademio de Esperanto; la reprezentado de la Esperanto-movado antaŭ la naciaj kaj lokaj aŭtoritatoj kaj la publiko; la plivastigo, pere de Esperanto, de la rilatoj inter Belgio kaj aliaj landoj.
La societo posedas la juran proprietecon de la kapitalo de la Fondaĵo Jaumotte-Loquet.
Por atingi siajn celojn, ĝi povas efektivigi au organizi prelegojn,kursojn, eldonojn,ekspoziciojn, kongresojn kaj vojaĝojn; tiucele apliki ĉiujn necesajn rimedojn kaj fondi organizaĵojn.
La societo estas nepre neŭtrala rilate ĉiujn temojn kiuj ne senpere koncernas sian societan celon.
Pere de la societo aŭ en ĝi ne povas esti farata propagando, kiu ne estas konforma al tiuj celoj.

Ĝia oficiala lingvo, por interna kaj internaciaj uzoj, estas Esperanto.

Par. 4-a :
La membronombro estas ne limigita, sed devas almenaŭ atingi dek. La membroj povas aliĝi al la federacio ĉu individue, ĉu pere de grupo. Tiuj membroj estas la efektivaj membroj de la societo sen profita celo.
Fakaj grupoj aŭ asocioj, havante la sidejon en Belgio, povas aliĝi al la federacio. La membroj de tiuj fakaj grupoj aŭ asocioj estas , en tia kazo, konsiderataj kiel asociaj membroj.

Par. 5-a :
Minimume la tri kvinonoj el la membroj devas esti belgoj.

Par. 6-a :
Membreco, ĉu efektiva, ĉu asocia, estas definitiva post akcepto de la administrantaro, pri kiu parolas la par. 9-a kaj kiu decidas sen motivigo. Membroj, kiuj agas evidente kontraŭ la celoj de la societo, povas esti eksigataj fare de la ĝenerala kunsido.

Par. 7-a :
La jara minimuma kotizo estas fiksita je dudek frankoj, la maksimumo je mil frankoj.

Par. 8-a :
Membroj povas ĉiumomente forlasi la societon, sendante sian eksiĝon per letero al la federacia prezidanto. Membroj kiuj ne pagas la ŝulditan kotizon, estas konsiderataj kiel eksiĝantaj.

Par. 9-a :
La societon administras administrantaro konsistanta el almenaŭ naŭ membroj, elektitaj de la ĝenerala kunsido inter la membroj, ĝis la sekvonta ĝenerala kunsido. Ilin ĉiam povas eksigi tiu sama kunsido.
A. Ĉiu grupo rajtas reprezentiĝi sin en la administrantaro de unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj, enskribitaj en la grupo, je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.
B. Dek reprezentantoj de la federacio, tiu estas, personoj nomitaj de la administrantaro por reprezenti la federacion en lokoj kie ne ekzistas grupoj, aŭ dek izolaj membroj, kaj ĉiu nova komen-

ciĝinta deko de tiuj du kategorioj, povas proponi po unu administranto.

C. La fakaj federaciaj estraranoj pri kiuj parolas par. 11-a, estas administrantoj, se ili ne ankoraŭ estas administrantoj de kategorio A aŭ B.

D. La administrantoj antaŭviditaj sub A, B kaj C, rajtas proponi al la ĝenerala kunveno liston d kooptaj administrantoj ĝis unu triono de sia nombro, tiel ke estu entute almenaŭ 3 administrantoj por ĉiu lingva regiono

E. Ĉiu komenciĝinta cento da asoci aj membroj rajtas reprezenti si en la administrantaro de unu membro, kondiĉe ke tiu administranto estas membro de la Belg Esperanto-Federacio.

Par. 10-a :

La administrantaro havas plej kompletan kompetentecon por la administrado de la societo. Ĉio, kio ne estas, laŭ la statuto aŭ la leĝo, nepre rezervita al la ĝenerala kunsido, restas en la kompetenteco de la administrantaro.

La administrantaro redaktas regularon de interna ordo, kiu difinas pli detale kiel la societo devas plenumi la statuton. Tiu regularo estas submetota por aprobo al la unua sekvonta ĝenerala kunsido. La federacia prezidanto estas devigata kunvoki la administrantaron post motivita peto subskribita de tri administrantoj.

Par. 11-a :

La administrantoj el ĉiu lingva regiono komunikas la nomojn de tri membro-administrantoj el sia regiona estraro, kiuj konsistigas la federacian estraron, kune kun la sekvantaj funkciuloj, kondiĉe ke tiuj ĉi ne jam estas elektitaj :

- la peranto kaj komitatanoj de la Universala Esperanto-Asocio;
- la redaktoro de la nacia gazeto;
- la direktoro de la eldonejo-librejo Sonorilo;
- la delegito de la Belga Esperantista Junulara Asocio;
- la administranto de la fondaĵo Jaumotte-Loquet.

La administrantoj elektas inter tiuj federaciaj estraranoj la federacian prezidanton, almenaŭ unu federacian vicprezidanton, la ĝeneralan sekretarion kaj la federacian kasiston.

La federacia estraro plenumas la decidojn de la administrantaro kaj prizorgas la ĉiutagan gvidadon de la societo. Urĝajn decidojn povas preni la federacia estraro kondiĉe ke ili estu submetataj por aprobo al la unua sekvonta administrantara kunsido.

La federacia estraro administras la kapitalon de la fondaĵo Jaumotte-Loquet, kaj delegas tiucele ĉiujare dum la ĝenerala jarkunveno, administranton kiu respondecas pri la teĥnika flanko de la administrado.

Par. 12-a :

Ĉiuj aktoj, kiuj ligas morale aŭ finance la societon, devas esti subskribitaj ĉu de la federacia prezidanto kaj de la ĝenerala sekretario, ĉu de la federacia prezidanto kaj de la federacia kasisto.

La administranto de la fondaĵo Jaumotte-Loquet rajtas akcepti disponigitajn sumojn kaj valorojn nome de la Fondaĵo, se la belga civila leĝo ne malpermesas tion, kun escepto de nemoveblaĵoj. Tiu administranto disponas pri la subskribopovo en rilatoj kun bankoj, financaj institutoj, agentejoj, ktp. se temas pri la bona administrado de la kapitalo en totalo kaj la elpago aŭ la uzo de la sumoj disponeblaj laŭ la decido de l'estraro de la Belga Esperanto-Federacio.

Par. 13-a :

Procesojn iniciatas en nomo de la societo kiel plendanto aŭ sekvas kiel defendanto, la administrantaro, persekute kaj diligentece de la federacia prezidanto; procesojn iniciatas en nomo de la fondaĵo Jaumotte-Loquet kiel plendanto aŭ sekvas kiel defendanto, la estraro, persekute kaj diligentece de la federacia prezidanto.

Par. 14-a :

Ĉiujare la ĝenerala kunsido devas okazi dum la monato marto.

Par. 15-a :

Kunvokoj okazas per nura publikigo en la organo de la societo aŭ per ordinara cirkulero perpoŝte sendita kiel presaĵo. Ili mencias la tagordon. La kunsido povas tamen priparoli punktojn kiuj ne aperas sur la tagordo.

La kunsidoj kaj la nomigoj okazas kaj la decidoj estas alprenataj laŭ la kutimaj reguloj de la interkonsiliĝaj kunvenoj.

Koncerne la voĉdonrajton, ĉiu membro, ĉeestanta la ĝeneralan kunsidon, rajtas je unu voĉo. Asocia membro ne havas voĉdonrajton.

Ne-ĉeestanta membro povas sin reprezentigi de iu ĉeestanta membro provizita de skriba mandato.

La ĝenerala sekretario komunikas la decidojn de la ĝenerala kunveno al ĉiuj administrantoj pere de cirkulero. Ĉiu membro povas postuli ekzempleron de tiu cirkulero, kiel ankaŭ la eksterstarantoj; tiuj lastaj tamen nur post konsento de la federacia estraro.

Par. 16-a :

La societa jaro komenciĝas la 1-an de januaro kaj finiĝas la 31-an de decembro.

Ĉiujare estas fiksita la kalkulo de la pasinta societa jaro kaj starigita la budĝeto de la sekvonta jaro. Ambaŭ dokumentoj estas submetotaj al la ordinara ĝenerala kunsido.

La ĝenerala kunsido povas modifi la statuton laŭ la kondiĉoj de paragrafo 8-a de la leĝo de la 27-a de julio 1921-a.

Par. 17-a :

La likvido de la societo okazas laŭ la kondiĉoj de paragrafo 20-a de la menciita leĝo.

Eksiĝinta aŭ eksigita membro, aŭ la heredantoj de formortinta membro, konservas nenian rajton je la societa havaĵo, eĉ ne en okazo de likvido de la societo.

Par. 18-a :

Okaze de likvido, kiam kaj kial ajn, la neta aktivo, restanta post pagado de ŝuldoj kaj enordigo de la debetoj, estas laŭ decido de la ĝenerala kunsido, dividita inter la grupoj, kiuj ĝis tiam partoprenis en la societo aŭ, ĉe malesto de tiuj grupoj, donacita al iu grupiĝo aŭ organizaĵo kiu sin okupas plue pri la propagando por Esperanto, aŭ ankaŭ al "Universala Esperanto-Asocio" aŭ alie al iu Belga organizaĵo kun bonfara celo kaj internacia karaktero.

---

NOVA REGULARO PRI INTERNA ORDO

akceptota de la Ĝenerala Jarkunsido de 16-3-1974
(laŭ paragrafo 10-a de la Statuto

1. ESTRARO kaj REGIONA ESTRARO

Par. 1-a :

La federacia sekretario prizorgas la ĝeneralan korespondadon kun oficialaj instancoj kaj aliaj asocioj aŭ personoj, kaj aplikas la paragrafojn de la statuto, kiuj rilatas la kunsidojn ĝeneralajn kaj administrantarajn.

La regiona estraro, elektita de la administrantoj de lingvoregiono laŭ la principoj de par. 15-a de la statuto, respondecas pri la informado pri Esperanto en la senco de la direktivoj de U.E.A. koncerne la inform-centro en ĉiu lando. Ili prizorgas inter alie la korespondajn servojn kaj kursojn, la gazetaron servon, la ekspozician servon kaj la eldonon de nacilingva gazeto.

Par. 2-a :

En la limoj de la federacia budĝeto la federacia kasisto repagas la administrantajn elspezojn de la regionaj estraroj. Por financi neordinarajn agadojn necesas antaŭa aprobo de la federacia estraro aŭ de la administrantaro.

2. ORGANO.

Par. 3-a :

Kiel ligilo inter siaj membroj, la federacio eldonas revuon.

Ĉiuj enpresaĵoj estu en Esperanto, escepte okaze de nepra bezono kaj kun aprobo de la estraro.

La revuo publikigas novaĵojn kaj artikolojn de la aliĝintaj fakaj asocioj aŭ grupoj sub ties respondeco.

3. GRUPOJ, REPREZENTANTOJ kaj
FAKAJ ASOCIOJ aŭ GRUPOJ.

Par. 4-a :
Esperanto-grupo kaj fakaj asocioj aŭ grupoj, kiuj deziras aliĝi al la federacio, petas tion skribe al la federacia ĝenerala sekretario.

La peto devas esti subskribita de ĝia prezidanto kaj de ĝia sekretario. Al tiu peto estas aldonita:
a) kompleta listo de la estraro;
b) por la fakaj grupoj kaj asocioj: la membronombro; por grupo: membrolisto kun nomo, antaŭnomo kaj adreso de ĉiu membro, eventuale ankaŭ la nacieco kaj la profesio, kaj por membroj malpli ol 25 jaroj, la naskiĝdato.
c) ekzemplero de la statuto aŭ de projekto de statuto.

Par. 5-a :
Ĉiu grupo kaj ĉiu reprezentanto enkasigas, ĉiujare, la kotizojn kaj transpagas al la federacia kasisto la parton destinitan al la federacio.

Par. 6-a :
Estas konsiderataj kiel plenrajtaj membroj de la Federacio :
a) la subtenantaj membroj
b) la plenaĝaj membroj
c) la junulaj membroj (inter 16 kaj 25 jaroj)
d) la kadetaj membroj (malpli ol 16 jaraj)
e) la enloĝantaj membroj (familianoj de membroj sub a kaj b loĝantaj al sama adreso).

La kotizo de la membroj sub a,b, c kaj d entenas la abonon al la federacia revuo.

Par. 7-a :
La asociaj membroj pagas pere de la faka asocio aŭ grupo kiu fiksas, interkonsente kun la estraro de Belga Esperanto-Federacio, la pagotan sumon. Tiu kotizo rajtigas la ricevon de interkonsentota kvanto da ekzempleroj de la revuo pere de la faka asocio aŭ grupo.

Par. 8-a :
La administrantaro povas akcepti, ĉu senpere, ĉu pere de la grupoj aŭ fakaj asocioj aŭ fakaj grupoj, la aliĝon de simpatiantoj kiel "amikoj de Esperanto". Tiuj ne estas efektivaj membroj de la societo; ili povas ĉeesti la kunvenojn de la Federacio kaj de la grupoj, sed havas nur konsilan voĉdonrajton.

Par. 9-a :
En lokoj, kie ne ekzistas grupo, la Federacio povas nomi reprezentanton, kies ĉefa tasko estos : klopodi fondi lokan grupon.

Par. 10-a :
Sur ĉiuj dokumentoj la grupoj sekvigu la titolon de sia grupo per la mencio : "aliĝis al Belga Esperanto-Federacio".

Par. 11-a :
Krom jam ekzistantaj esceptoj, la Federacio havu, laŭprincipe, nur unu grupon en sama loko aŭ aglomeracio. Se, en iu loko, pli ol unu grupo ŝajnas utila, la administrantaro povas akcepti alian grupon.

4. LIKVIDO.

Par. 12-a :
Okaze de likvido de iu grupo aŭ de iu reprezentanta ofico (vidu par. 9-a), la tuta propraĵo transiros al la Federacio. Tamen tiu propraĵo restos dum tri jaroj je la dispono de eventuala nova organizaĵo aŭ de nova reprezentanto en la sama loko aŭ aglomeracio.

5. VOĈDONADOJ.

Par. 13-a :
Ĉiuj decidoj estos alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj okazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la federacia prezidanto estas decidiga.

6. KONGRESOJ.

Par. 14-a :
La estraro organizu ĉiujare, laŭ ebleco, kongreson aŭ semajnfinan renkontiĝon laŭ speciala regularo aprobota de la administrantaro.

Tiu kongreso aŭ renkontiĝo povas okazi ekster la belga teritorio kaj eventuale en kunlaboro kun alilandaj asocioj, se la administrantaro aprobas tion.

STATUTO de FONDAĴO "JAUMOTTE-LOQUET"
sub administrado de Belga Esperanto-Federacio

1. STARIGO - ORGANIZADO.

Par. 1-a :
En 1965, okaze de sia 55-jara vivjubileo, Gesinjoroj A.Jaumotte-Loquet disponigis 50.000 fr. por starigi fondaĵon kies kapitalon apartenas, en jura proprieteco, al la asocio sen profitdona celo, "Belga Esperanto-Federacio".

Par. 2-a :
Ĉiuj asocioj, grupoj kaj individuaj personoj povas pligrandigi tiun komencan kapitalon per transdono de sumoj, valoroj aŭ nemoveblaĵoj al la Belga Esperanto-Federacio, asocio sen profitdona celo, kiu eventuale akceptas, se la civila leĝo tion postulas, pere de la personoj indikitaj en par. 12 de la statuto de tiu asocio.

Par. 3-a :
La estraro de Belga Esperanto-Federacio, fiksita laŭ par. 11 de ties statuto, administras la kapitalon kaj respondecas pri la fruktoj kiel : rentumoj, premioj, luprezoj, ktp. Ĝi ne rajtas malpliigi la totalon de la ricevitaj sumoj, valoroj aŭ nemoveblaĵoj, en tiu senco ke la administrado de tiu totalo okazos laŭ la klarigoj kiujn donas la belga civila leĝo al "bona administrado".

Par. 4-a :
La estraro de Belga Esperanto-Federacio delegas ĉiujare, dum la ĝenerala jarkunsido de tiu asocio, administranton kiu respondecas pri la teĥnika flanko de la administrado kaj kiu rajtas akcepti disponigatajn sumojn kaj valorojn se la belga civila leĝo ne malpermesas tion.

Par. 5-a :
La administranto disponas pri subskribpovo en rilatoj kun bankoj, financaj institucioj, agentejoj, ktp. se temas pri la bona administrado de la kapitalo en totalo kaj la elpago aŭ la uzo de la sumoj disponeblaj laŭ la decido de la estraro de Belga Esperanto-Federacio.

Par. 6-a :
Ĉiujare, dum la ĝenerala jarkunsido de Belga Esperanto-Federacio, raportas la administranto al la estraro de tiu asocio kaj tiu estraro, samdate, decidas pri la uzo de la disponigitaj sumoj.

2. CELO.

Par. 7-a :
La disponigebla rentumo, premioj, luoj kaj ĉiaj fruktoj de la kapitalo estas destinataj por la propagando kaj la informado pri la internacia Lingvo Esperanto en Belgio, kaj ne estas limigataj per la rektaj celoj de Belga Esperanto-Federacio mem, sed ĝenerale por la belga movado pri Esperanto.

3. LIKVIDO.

Par. 8-a :
Se Belga Esperanto-Federacio likvidiĝas, la lasta estraro decidas pri la transdono de la jura proprieteco kaj de la administrado al :
a) se la likvidrezulto estas disponigata al grupoj (laŭ par. 18 de la statuto de tiu asocio) : grupo de personoj, delegitoj de la grupoj proporcie po unu persono por ĉiu plena dudeko de la grupaj gemembroj, kiu estis ankaŭ membro de Belga Esperanto-Federacio dum la lasta jaro de plena aktiveco;
b) se la likvidrezulto estas disponigata al asocio (laŭ par. 18 de la sama statuto): la asocio mem por la jura proprieteco kaj al la estraro de la asocio por la administrado.

---

Nova libro-listo de la dana Esperanto-eldonejo ĵus aperis. Ĝi estas 12- paĝa kaj ampleksas pli ol 50 titolojn, preskaŭ ĉiuj kun kliŝo-desegno. Sur paĝo 2 troviĝas la plej novaj eldonoj, i.a. du libroj por geknaboj kaj la klasikaĵoj de nia fama stilisto KABE: "Patroj kaj Filoj" de Turgenjev kaj "La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj" de diversaj polaj verkistoj. La libro-listo estas senpage havebla ĉe Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbehøj, Danujo.

## DISE EN LA MONDO

N-ro 2 de la "Fornistro" (por instruo kaj distro) aperis. Ĝi estas literatura kajero kun tre varia enhavo : artikoloj, poemoj, spritaĵoj recenzoj, rakontoj ktp. kun multaj fotoj kaj ilustraĵoj. 52 paĝoj. 22 cm. Prezo: 5 guldenoj au egalvaloro. Mendojn kaj pagojn al : A. Hrynkiewicz, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino

La Esperanto-lernantoj de la Liceo Chevrollier (Francujo), kunlabore kun la Esperanto-klubo de Angers, preparas ekspozicion pri SPORTO EN LA MONDO. Ili atendas diversajn aferojn rilatantajn, eĉ modestajn. Esperanto-Rondo, Liceo Chevrollier F-49000 Angers (Francujo).

La 9-an de Februaro okazis en Gent la Esperanto-tago de la Belga Esperantista Fervojista Asocio. Prelegis du personoj el Antverpeno, s-ro P. Peeraerts pri "Modernaj instrumetodoj" kaj J. Haazen pri "Konsideroj pri Esperanto". Ceestis proksimume 30 personoj.

Karel Jonckheere, fama flandra verkisto, publikigis en "De Nieuwe Gazet" tre favoran artikolon pri Esperanto. La teksto aperis komplete en Esperanto-Panorama de jan.-feb. 1974. Karel Jonckheere krome dum festparolado en la "Willems-fonds" citis la Internacian Lingvon.

La 15-a Eŭropa Ferio-Semajno estos organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ĝi efektiviĝos de la 22-a ĝis la 28-a de septembro en Magliaso ĉe la Lugana Lago. La programo ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, Esperantokursojn, distrajn aranĝojn. Info ĉe s-ro Ernt Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svisujo).

---

Pro la granda amplekso de la statutoj kaj regularoj aperantaj en tiu ĉi numero, ni nun ne povas publikigi recenzojn. Ni petas iom da pacienco ĝis la venonta numero (marto).

Ekestis nova organizo kaj nova gazeto : la asocio por kolektantoj de Esperanto-insignoj. Ili eldonas revueton "Bulteno". Ĉiu kiu interesiĝas pri kolektado de esperantaĵoj povas sin direkti al s-ro Vlàda Hasala, S.K.N. 37, CS-695 03 Hodonin, Ĉeĥoslovakio.

Kaj alia fakorganizo internacia : ĝia celo estas servi per Esperanto gesamseksemulojn virajn kaj inajn tra la mondo. La agadplano de la grupo estos laŭ la decidoj de la membraro, sed inter la eblecoj estas korespond a servo, vojaĝa kaj novaĵa servoj. Se vi deziras kunlabori por plibligi amikecon kaj helpemon inter gesamseksemuloj ĉie en la mondo, skribu (uzante kaŝnomon se vi preferas) al Ulo, 11325 Blix Street, N. Hollywood, Calif. 91602, Usono. Via identeco restos tute konfidenca.

## Reĝa Brusela Grupo Esperantista

Dum la ĝenerala jarkunveno, okazinta la 6an de februaro 1974, jena komitato estas elektita :
Prezidanto : S-ro G.C. Fighiera
Sekretariino : S-ino E. Ernst
Kasistino : S-ino R. Jacobs
Helpsekretariino : F-ino S. Opsomer
Plue la ĝenerala jarkunveno decidis nomigi S-ron René JACOBS (kiu eksiĝis post 20-jara prezidanteco) kiel HONORAN PREZIDANTON de la Brusela grupo.

## "L'Esperanto sans peine"

Vi verŝajne jam eksciis ke Assimil eldonis Esperanto-kurson "L'Esperanto sans peine". Jam nun ĝia sukceso estas tre granda. Interalie Belga Esperantista Fervojista Asocio akceptis ĝin kiel oficialan franclingvan kurson de la asocio.

Jean Thierry, la verkinto de la kurso, subskribos sian verkon dum la internacia librofoiro, okazonta en la Rogier-centro en Bruselo. S-ro Thierry estos en la Assimil-stando sabaton la 16-an de marto de la 14-a ĝis la 17-a kaj dimanĉon la 17-an de la 14-a ĝis la 16-a horo. Ĉiu estas bonvena !

## Deziras korespondi...

S-ino Shigeyo Mori, 127 Takigawa-cho, Showa-ku, 466 Nagoya, Japanujo, dez. kor. kun kiu ajn en Belgio.

Pagliaeo Italo, Instituto Alberghiero, I-88018 Vibo Valentia, CZ, Italujo, dez. kor.

Kaposi Ibolya, H-8901 Zalaegerszeg Ifjùsàgi Hàz, Hungarujo, ŝatus korespondi.

Miaj hobioj estas naturo, historio, memoraĵoj, sporto, amuzado, kolektado de metalaj insignoj, bildkartoj, flagoj kaj mi ŝatus kor. kaj event. interŝ. kun junul(in)o.
Jozef Reinvart, H-2442 Szazhalombatta 2, P.F. 16, Hungarujo.

Pavel Achrer, Husova 502, CS-676 02 Mor. Budejovice, Ĉeĥoslovakio, dez. kor.

28- jara ministo, 6-lingva, dezirus ekkoni Belgion kaj tial ŝat. kor. kun kelkaj familioj. Lia nomo kaj adreso : Jànos Beleznai, H-2800 Tatarabanya, Györi u. 16, Hungarujo.

Sinjoro Miguel Hernandeza , 60// 729 Altos, Esquina 7a B, Marianaod, Habana Cuba.

Rado Agneta, Oradea, C.P. 212, Rumanujo, dez. kor.

Pri mondkonceptaj, moraj kaj religiaj aferoj, senco de vivo, Kristo kaj savo, kun ĉiuj, precipe nekristanoj, kor. Stanislaw Pietrzak, 25 Krakowska, PL-39 200 Debica, Polujo Laueble interŝ. de diversaĵoj.

Mi dez. kor. kun knabino 14-15-jara el Polujo. Kiu helpos ? Erik Buelinckx, J.B. Vandenboschstraat 67, B-1641 Alsemberg.




## EŬROPA FONDUSO

En junio de la pasinta jaro okazis en Luksemburgo, kiel vi kompreneble scias, Esperanto-kongreso de la landoj de la Eŭropa Komunaĵo. Tiam, dum la ferma kunsido, estis fondita Eŭropa Fonduso, kiu devus havi kiel celon la financadon de la laboroj de la Esperanto Eŭropa Centro.

Samtempe kaj spontanee la gekongresanoj donacis por la ĵus kreita, fonduso, jam notindan sumon, kiu ebligis tujan funkciadon de la Centro. Pri tiu ĉi Centro vi, verŝajne, jam legis en la Esperanta Gazetaro. Sed pri la fonduso vi ankoraŭ nenie povis legi. Ĉar dum la kreiĝo de la fonduso mi prenis la iniciaton kolekti la donacatajn sumojn, mi ŝuldas al ĉiuj donacantoj informon pri la rezulto de la kolektado. Tion mi volas fari nun, kun pardonpeto pri la prokrasto.

Mi kolektis entute : 5 640 belg.fr., 1 150 luks. fr., 50 fr. fr., 48 germ. m. kaj 102 ned. guld..
La tuta sumo kalkulita en guldenoj estis 544.95.

Tiun sumon mi transkontigis al konto, en banko, speciale por tiu celo rezervita.

Do, nia Eŭropa Fonduso ekzistas kaj subtenas la laborojn kaj agadojn pri kiuj vi regule povas legi en via gazeto, de Esperanto Eŭropa Centro.

Sed, estas tute kompreneble ke, tiu sumo ne rajtas elĉerpiĝi, ĉar tiam la funciado de E.E.C. stagnados kaj tion ni certe bedaŭrus. Tial mi volas varme apelacii al ĉiuj esperantistoj ke ili donacu sum(et)on, se eble regule al nia Eŭropa Fonduso.

Donacojn oni povas sendi al : poŝtĉekkonto no. 511036, t.n.v. Rabobank, Schoorl, t.n.v. no. 3505. 52-400, t.n.v. Esperanto Eŭropa Centro.

Ĉu eble kasistoj de lokaj kluboj kaj landaj asocioj volas kolekti la donacojn kaj transkontigi la kolektitan sumon ? Antaŭdankon al ĉiuj.

J. Calado

Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** P.V.B.A.

**ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30**

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"
Agentejo en Nederlando:
ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9
Telefono 1142 19 – Telekso 23243 – Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

P. V. B. A.

*FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN*

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

**Telefono 272875**